# La Riverego

Majo 2002 | Esperanto-Societo Kebekia | Nro 67, Jaro 16a


# Vizitis nin !

Pasporta Servo estas tre utila gastiga servo ne nur por vojaĝi al fora lando, sed ankaŭ por viziti Montrealon. Jes ja, regule estas esperantistoj el diversaj landoj kiuj venas al Kebekio kaj uzas la servon. Mi rakontu pri la tri lastaj gastoj ĉe la montreala Esperanto-domo.

En februaro venis Jinsu So, profesoro pri ekonomiko ĉe Kangnam Universitato en Seulo, Koreio. Li fakte vojaĝis tra tuta Kanado por renkonti samfakulojn kaj tiel interŝanĝi informojn pri Kanada ekonomio. En nian gastolibron li skribis jene : "Mi restis kvazaŭ hejme dum tri tagoj, danke al ĉiuj familianoj. Longan tempon mi memoros unuan tagon de tiu ĉi gastigo, ĉar najbarino donis ŝlosilon de via domo al mi, kiu venis de tiel fora lando kun azian mienon. Mi ne subtaksu ke viaj gefiloj estas bone edukitaj. Je la unua vido, via filo salutis dirante 'ĉu vi alvenis delonge?' kaj via filino salutis kaj demandis ĉu mi volas legi ion esperante? Ho Karaj! Kaj valorus mencii la bonkorojn de la gepatroj kiuj donis detalajn klarigojn, orientiĝo (ne okcidentiĝo) pri aŭtobusoj, dono de muzeomapon, ktp. Reciprokan gastigadon esperante".

Meze de aprilo vizitis Den Drown el Florido kaj Carlos Gonzalez el Meksiko. Ili ambaŭ laboras pri komputiloj. Jen kion ili skribis: "Plej korajn dankojn al vi ĉiuj. Ni ĵus ekpasportservumas kaj ni tre ĝuis viziti kaj babili kun vi ĉe taso da varma teo. Krome la urbo estas tiom bela kaj vigla. Ĉi tiu vizito estas nur mia dua fojo esti tia gasto en Esperantio kaj por Karlo estis la unua. Kia bonega sperto. Estas iom kiel havi familiojn ĉie tra la mondo. Estis mirinda vidi la tutan familion parolantan esperanton. Do, dankon por ĉio kaj se vi iam ajn estos en Florido aŭ poste en Meksiko, vi estos bonvenaj en nia hejmo". Kaj Carlos lasis en la sama libro: "Dankon. Montrealo estas tre bela kaj vi estas tre afabla familio, plaĉis al mi loĝi kun vi, dankon denove".

Do, mi volis prezenti tion por inviti vin fariĝi gastiganto en Pasporta Servo (P.S.) aŭ kuraĝigi vin uzi la servon. Kiel vi vidas, akceptante gastojn, vi ricevas inviton viziti ilin poste kaj tio estas vere bela sperto dum vojaĝo, viziti hejmojn.

Kontaktu nin por ricevi la aliĝilon al P.S. aŭ se vi ŝatus aĉeti la adresaron por mem uzi ĝin.

**Normando**
**Prezidanto**
**Esperanto-Societo Kebekia**

# 2-a SEBO - Semajnfino
# Esperanto kaj biciklado

**Ni invitas vin al SEBO eĉ se vi ne biciklas. Ni proponos al vi multe pli ol biciklado, dum la 2-a SEBO.**

Programo : Vendrede vespere ĉe la Montreala Esperanto-Domo (MEDO) okazos amika babilado ekde la 19-a horo. Sabate matene je la 9-a horo okazos prelego pri kiel ripari biciklon. Vi estas bonvena veni (per) kun via biciklo ĉar estos praktika parto dum oni povos mekanike pretigi sian biciklon por la morgaŭo. Ni kune tagmanĝos kaj poste vizitos la malnovan Montrealon aŭ muzeon (se la vetero malbelas). Sekvos komuna vespermanĝo ĉe MEDO kaj poste distra vespero. Dimanĉe, ni partoprenos Le *Tour de l'île*. Jam aliĝis 4 junaj esperantistoj el Bostono kaj Nov-Jerzeo. Vi kompreneble povas partopreni nur parton de la semajnfino. Ni nepre bezonas tuj scii ĉu vi biciklos kun ni ĉar ni devas grupe aliĝi kaj pagi por *Le Tour de l'île*.

*2-e SEBO - Fin de semaine vélo & espéranto: Nous vous invitons à participer à la fin de semaine...*

# Fêtez avec nous les 20 ans de la SQE!

**Juin**

1-2: Week-end Espéranto et cyclisme (SEBO): Le samedi se tiendra une excursion à vélo (ou à pieds) dans le Vieux-Montréal, avec atelier sur la réparation des vélos, un souper communautaire ou un pique-nique, puis une soirée amusante. Dimanche, nous vous invitons à participer au Tour de l'île de Montréal avec de jeunes espérantistes des États-Unis. Abonnez-vous vite: esperanto@sympatico.ca ou 514 272-0151.

**Septembre**

Vendredi le 6: À la Maison de l'espéranto de Montréal, à 18h: souper latinoaméricain (apportez un plat pour partager). Suivront des présentations sur les congrès de cet été au Brésil.

Vendredi, le 13: Bavardage amical au Restaurant Le Commensal, au 1720 de la rue Saint-Denis, à Montréal, à 19h30. Nous pourrions grimper le mont Royal par la suite!

21-22: Week-end automnal à Québec. Visite d'un musée ou de la Vieille-Ville, repas communautaire avec des espérantistes locaux. Visite au Café Jeunesse Espéranto à Lévis et sur la rue de l'Espéranto à Québec. Abonnez-vous vite: esperanto@sympatico.ca ou 514 272-0151. Possibilités de covoiturage. Nous passerons la nuit chez des espérantistes ou dans une auberge de jeunesse.

Vendredi, le 27: À la Maison de l'espéranto de Montréal, à 19h30: Musique en espéranto, jeu d'hymnes nationaux, etc.

**Octobre**

Vendredi le 5, à 18h: Pains et fromages (apportez les votres pour partager). Nous fournissons les légumes et les boissons. Patrick et Jacqueline vous accueillent au 1043 de la rue Pratt, à Outremont. Sortez au métro Outremont, puis prenez l'autobus Van Horne vers l'est jusqu'à la rue Pratt.

12-13-14: 9e Week-end espérantiste international à Okemo, au Vermont. Réservez vite votre place!

Vendredi, le 18 à 19h30: Bavardage amical au Restaurant Le Commensal, au 1720 de la rue Saint-Denis, à Montréal.

Vendredi, le 25: Maison de l'espéranto de Montréal, à 19h30: Discussion sur le thème Voyages et Pasporta Servo.

**Novembre**

Vendredi, le 1er: Souper asiatique à 18h chez Danielle, au 7122 de la rue Fabre, appartement 1, juste à côté du métro Fabre. (Apportez un mets asiatique pour partager.)

9-10: Week-end à Trois-Rivières. Visite de la ville et repas communautaire avec des espérantistes locaux. Visite sur la rue de l'Espéranto.

Vendredi, le 15: Bavardage amical au Restaurant Le Commensal, au 1720 de la rue Saint-Denis, à Montréal.

Vendredi, le 29: Maison de l'espéranto de Montréal, à 19h30: Jeux en espéranto.

**Décembre**

Vendredi, le 6 à 19h30: Bavardage amical au Restaurant Le Commensal, au 1720 de la rue Saint-Denis, à Montréal.

14-15: Week-end de festivités pour le 20e anniversaire. La programmation sera annoncée sous peu.

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto six fois par année. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Autrement, l'abonnement annuel est de 10$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia sesfoje dum la jaro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.

**Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2002.07.01**

Rédacteur en chef/Ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Ont collaboré à ce numéro/Kunlaboris al tiu ĉi numero Normand Fleury, kaj Sylvain Auclair (Korektado). Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/prezidanto), Jérôme-Frédéric Bouchard (vice-président/vicprezidanto), Sylvain Auclair (trésorier), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario) kaj François Bay.

Esperanto-Societo Kebekia/Société québécoise d'espéranto
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal (Québec)
H2G2R8
Telefonrespondilo kaj telekopiilo/Répondeur et télécopieur: (514) 272-0151
jessylapointe@hotmail.com
http://www3.sympatico.ca/esperanto